

Esperanto kaj Interlingua

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 710, 1977.05.18 & 20 & 21

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Ekde la komenco de sia vivo esperanto ĉiam estis konfrontata al konkurenca planlingvo : unue Volapük ĝis la fino de la deknaŭa jarcento, poste Idiom neutral ĝis la Delegacia Kunveno, kiu naskis en 1907 la lingvon Ido. Sekvis en 1922 propono favora al la projekto Occidental, kiun oni nomas nun Interlingue. Kaj fine en 1951 la naturalisma tendenco ovis je nova projekto sub la nomo Interlingua.

A.- La esperantistaro ignoras tiujn ĉi projektojn, sed en la ekteresperantaj medioj pri ili oni tamen atentis, ĉefe kiam temas pri decido favore al la enkonduko de esperanto-instruado en publikaj lernejoj. Tion povis konstati en Svislando la kampanjo Esperanto en la Lernejojn. Tial tiu ĉi kampanjo petis la itallingvan svison, kiu estas samtempe praktikanto de esperanto kaj de la lingvo-projektoj Ido, Occidental kaj Interlingua, verki komparan studon pri esperanto kaj Interlingua.

Cl.- El tiu ĉi rezultis ampleksa studo pli ol 170-paĝa, kiu aperos en la kolekto *Studoj de Kultura Centro Esperantista sub la ekzakta titolo Faktoj kaj teorioj kontraŭ mitoj kaj antaŭjuĝoj : Esperanto aŭ Interlingua ?* Sed ne estas per esperantlingva dika studo, ke estos eble defendi esperanton antaŭ neesperanta publiko, kiun influas la propaganda argumentado de adeptoj de Interlingua. Pro tio la kampanjo Esperanto en la Lernejojn poste petis la aŭtoron de la 170-paĝa studo, kiu verkiĝis sub la kaŝnomo Edo Bernasconi, redakti 20-paĝan resumon, kiun la sama kolekto *Studoj* povus aperigi en la franca lingvo. Tiu ĉi kajero ĵus aperis sub la titolo *Espéranto et Interlingua. Brève étude comparative*. La francigon faris sinjorino Nicole Piron, ekstradukistino ĉe UN en Nov-Jorko.

A.- Tiun ĉi 20-paĝan resumon ni prezentos al vi en esperanto laŭ la verko mem de Edo Bernasconi, kaj vi konstatos, ke fakte temas pri tre grava dokumento, kiu klare pledas helpe de sociolingvistikaj kaj lingvopolitikaj vidpunktoj por esperanto. Vi tre verŝajne deziros akiri la detalan studon, kies argumentado estas multe pli kompleta kaj kiun konkludas tre utila bibliografio.

Cl.- Jen ni eklegas al vi la resuman verkon de Edo Bernasconi : « *Kelkaj lingvistoj, ĝis antaŭ nelonge, kredis, ke lingvo estas io bilogie vivanta, estaĵo mistika, kiun ni plej respektas nur observu : la simpla supozo, ke oni povus ĝin plani, estis sentata kiel blasfemo.*

A.- *Sed la ĝenerala akcepto de la tezo de Ferdinand de Saussure, laŭ kiu lingvo estas fenomeno bazita sur komuna interkonsento (do esence socia), la moderna lingvistiko, kiu komencis analizi la lingvaj manifestiĝojn sur la bazo de hipotezoj pri ilia strukturo, kaj la lingvo-inĝenierado, kiu komenciĝis en Sovetunio, kaj kiun daŭrigis kaj plibonigis lingvistoj en la tiel nomata Tria Mondo, permesis pli konkretan sintenon koncerne lingvoplanadon : jes ĝi estas ebla. Ne nur koncerne ortografion kaj vortaron (afero konata depost multaj jarcentoj en niaj landoj), sed ankaŭ koncerne gramatikon, sintakson, kaj eĉ frazeologion.*

Cl.- *Kaj, plej mirinde, oni malkovris, ke eblas plani tutan lingvon. Iom post iom, en la daŭro de pluraj jaroj, oni ellaboris la teknikojn : ili estas plej diversspecaj, kaj dependas de sociolingvistiko kaj de aplikata lingvistiko.*

A.- *Oni aplikas ilin laŭ la celo, kiun oni volas atingi : ekzemple plani **renaskiĝon** de antikva lingvo (kiel la hebrea) postulas aliajn teknikojn, ol la planado de interdialekta skriblingvo (kiel devus esti la interromanĉa) aŭ la superdialekta interlingvo (kiel la indonezia). »*

Cl.- Dum la venontaj semajnoj ni daŭrigos la legadon de tiu ĉi studo, kiu komparas esperanton al Interlingua kaj komprenigos al vi, kial Interlingua ne povas esti vera konkuranto de la zamenhofa idiomo.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), septembro 2012